

& Balado pri maltima formiko:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 518 paŝoj dum 5 minutoj. Norda Kantaro #4497. Verkis kaj komponis Stefan Demert (1970). El sveda tradukis Martin Strid (2011) kaj per disdivido de strofoj donis en la melodio lokon por nova rekantaĵo (2015).>

(#Melodioj:

<:37> (

/mimi dodo mimi dodo; SoSo rere fafa re; SoSo rere fafa rere; SoSo dodo mimi do;

(#Rekantaĵe: dodo fafa lala fafa; dodo mimi soso mi; rere fafa rere; SoSo mimi soso mi; re emi fare Tire do o;)

)×14)+

(&Strofoj:

'1 /Mi sonigi volas liron ; kvankam estas nur gitar' ; kaj rakonti serĉan iron ; de formiko al pinglar'.

(×:; **Dancu per la ses piedoj ; Dancu paŝon post la paŝ' ; Ĉiun paŝon kredu ; kaj ne metu ĝin en maŝ' ; Dancu paŝon post la paŝ'.**)

'2 Li matennebulen kuris ; post fortrink' de ĉokolad' ; vakcinian vepron spuris ; ĝoja en kontenta sat'.

'3 Estis longa vojo lia ; vagi al proksima pin' ; malaperis de l' aliaj ; tamen ĝoja tenis sin.

'4 Kvindek metrojn de la nesto ; ĝuste dum la sunsubir' ; li pinpinglon trovis restan ; tute laŭ sia dezir'.

'5 Por ĝin levi li per forto ; devis streĉi sin kun pen' ; kaj komencis la transporto ; de la bela pinglo jen.

'6 Post kvar horoj da cirkulo ; venis al bierbotel' ; ĉion vidis tra nebulo ; brusto balgis pro anhel'.

'7 Ĝin sabate iu ĵetis ; Mi seniĝos je soif' ; pensis li, la ŝarĝon metis ; kaj engrimpis en l' edific'.

'8 Li fortrinkis lastan guton ; el biera katafalk' ; kaj sin batis kiel bruto ; kriis He mi estas alk'.

'9 Eĉ ne pinglon mi hejmtiros ; ne, nun estos da perturb' ; el arbaro mi foriros ; ĥaosigos en la urb'.

'10 Sed li tien ne alvenis ; baris io sur la pad' ; la formikon halto ĝenis ; pro giganta barikad'.

'11 Ĝi teruris al rigardo ; estis granda griza mas' ; la formiko vokis Ardon ; se malhelpas vi al pas'.

'12 Li atakis ĝin kolere ; etenditan en la vast' ; sed fiksiĝis malliberen ; kvazaŭ en glueca past'.

'13 Triste finas nun ĉi kanto ; per formika streba bat' ; sed lin tenis la giganto ; ĝis li mortis pro malsat'.

'14 Alkoholon ne impliku ; spita vi inertos dum ; se naskiĝis vi formiko ; ne batalu kun maĉgum'.)



